MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 10

OKTOBRO 2017 Kol.390/33

xxxx

Ĝi estis plenumita per kelkaj prelegoj kaj kompreneble per ekskursoj al interesaj lokoj.

Sabate, dum la interkona vespero, ni gustumis ĉefe aziajn kaj kelkajn alilandajn frandaĵojn. Koreaj esperantistoj dume prezentis belegan folkloran programon kun specifaj dancoj kaj muziko de sia kulturo. Krom variaj prezentadoj ni ĝuis gruo- kaj masko-dancojn.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro kun ĉeesto de kelkaj reprezentantoj de la urbo Busan. La prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean, bonvenigis la kongresanojn. Estis laŭtlegataj kelkaj bondezir-mesaĝoj. Dum la paŭzo ni aŭskultis specialajn koreajn muzikilojn. Sekvis salutoj de reprezentantoj de ĉeestantaj landoj kaj la prezidantino konigis al ni la kongresan temon pri turismo. Post la malfermo de la kongreso ni komune fotiĝis.

Estis enkondukitaj novaj programeroj: "Pedagogia foiro" kaj "Literatura kafejo". Tiucele estis prezentitaj kelkaj libroj kaj paroladoj pri diversaj temoj. La Nacia vespero mirigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni ĝuis variajn prezentadojn de la korea folklor-kulturo. Subtila estis *Dongrae* - la gruodanco, konata jam de la unua vespero.

La semajna programo inkluzivis E-kurson por komencantoj gvidatan de Annie Grente, progresantoj ĝuis viglan kaj amuzan kurson de Sylvain Lelarge kaj la instruistan trejnadon mastris

Katalin Kovats. La fidelaj partoprenantoj ricevis atestilon. Ne mankis lernado de la korea lingvo eksprese sub gvido de Park Yongsung (Nema). Kun Mireille ni krozadis tra la lingvoj. Oni diskutis pri la maniero enkonduki Esperanton en lernejojn. Ĝis nun oni vane strebis pri tio. Tamen, ni estas esperantistoj, do ni devas esperi… En aliaj programeroj oni parolis pri gramatikaj tiklaĵoj, pri E-centroj kaj pri privataj projektoj. Komitatanoj plenumis sian laboron dum pluraj kunsidoj. Estis pritraktita ankaŭ la "Jaro de la Lernanto".

Sur la urba placo, antaŭ la teatro okazis lingva festivalo en 16 lingvoj inkluzive Esperanton prezentitaj de la kongresanoj. Por la publiko, kiu bedaŭrinde ne abundis, estis aranĝita speciala kultura programo.

Ni spektis kvar filmetojn el la filmo-konkurso okaze de la Jaro de la Lernanto. Ni aljuĝis al unu el ili la premion de la publiko. Rilate al la temo pri turismo oni parolis pri la fama mondvojaĝanto kaj verkisto Tibor Sekelj. Marija Beloŝeviĉ parolis pri pozitivaj kaj negativaj efikoj de turismo. Aŭrora Bute, vestita en bela rumana kostumo parolis pri kulturaj specifaĵoj de Rumanio. Sur prezentitaj bildoj ni povis admiri surpentritajn preĝejojn ankaŭ de ekstere. La rumana bluzo inspiris plurajn famajn modistojn. Kortuŝa estis la rakonto pri "Miljara Animo" (Koryo te-bovlo). Rob Moerbeek prezentis la korean literaturon. Interesa estis la ludo "Bafa-Bafa", en kiu temis pri konfronto de du malsamaj kulturoj.

Tre bongusta kaj enhavriĉa estis la kongresa bankedo en urba restoracio. Ĝi kontentigis ĉiujn ĉeestantojn per varia elekto de

koreaj specialaj manĝaĵoj.

Al la kongresanoj estis proponitaj pluraj duontagaj ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵon. Unu el la tuttagaj ekskursoj estis destinita al vizito de la urbocentro de Busan. Alia tuttaga ekskurso celis la regionon de Gyeongu, kie ni vizitis antikvajn tombojn. Unu el ili estis enrigardebla. Sekvis vizito de monaĥejo, kie ni tagmanĝis kaj plonĝis en meditadon. Impresa estis vizito al la templo Bulguksa, mondheredaĵo de Unesko.

Ĉe la fino de la kongreso estis prezentita la Iberia duoninsulo, kie okazos venontjare la 51-a ILEI-kongreso en la hispana ĉefurbo Madrido de la 21-a ĝis la 28-a de julio. La portugala ĉefurbo Lisbono gastigos la 103-an UK-on tuj poste. Mireille Grosjean prezentis konkludan paroladon pri la kongreso kaj la rezolucion. Sekvis dankoj kaj gratuloj al busanaj esperantistoj, kiuj sukcesis organizi belegan kongreson. Tiele plenumiĝis bondeziroj de la urbaj reprezentantoj eldiritaj ĉe la inaŭguro. Ni ĝuis viglan kaj agrablan semajnon.

Liba Gabalda

Neforgesebla rememoro

de mia unua UK en Varsovio en Jubilea jaro 1987.

La 26-an de julio 1887 aperis la unua lernolibro pri Esperanto. Okaze de tiu jubileo oni aranĝis en Varsovio universalan kongreson sub aŭspicio de Roman Malinowski, prezidanto de la Pola Parlamento. Tre impona kongreso por mi! Impresoj pri ĝi restadas daŭre en mia memoro. Tamen unue estis necese aliĝi al ĝi. Por kontentigi niajn oficejojn estis necese peti oficialan inviton de la polaj organizantoj kaj poste solvi, kiamaniere

atingi Varsovion kaj restadon tie. Feliĉe slovakaj esperantistoj organizis busan ekskurson al la UK el Poprad. Tio montriĝis plej favorpreza por mi kaj por mia praga amiko, la kantisto Josef Vích. Anstataŭ veturi al Poprad ni veturis per rapidtrajno nokte el Prago al Varsovio, tie ni renkontis aliulojn.

La kongreso okazis en la Palaco de kulturo. Aliĝis ĉirkaŭ 6000 personoj el 60 landoj, fina kalkulo estis 5946 personoj, tamen multaj aliaj, nekalkulitaj, venis nur por unu tago, por vidi. Ĉar la kongreson en Varsovio povis ĉeesti amase la esperantistoj el socialismaj landoj, ĝi fariĝis la plej granda en la tuta historio.

Dum la tuta semajno ni povis senpage veturadi per publika trafiko tra Varsovio. En la kongresejo okazis multe da aranĝoj, prelegoj, ankaŭ spontaneaj aranĝoj. La solena inaŭguro okazis dufoje, ĉar la plej granda salono kapablis akcepti nur duonon de la aliĝintoj. Merkrede estis libera tago, dum kiu mi vizitis la reĝan palacon, sed preskaŭ la tutan tempon mi travivis en la kongresejo.

Sed estas plej grave, ke ĉie regis amika etoso, ke al ni ĉiuj sufiĉis unu komuna internacia lingvo por diskuti, babili. Dum la kongreso aperadis ĉiutage la Kongresa Kuriero redaktata de Stano Marček kaj Andrzej Pettyn. Neforgesebla estis vespera koncerto de la kanada kantistino, Joëlle Rabu. Mi ŝatis ankaŭ la riĉan bibliotekon. Jam pasis 30 jaroj, tamen rememoroj restas.

V. Stibůrek

Baltaj respublikoj en EU

Okaze de la UK en Nitra, 2016 mi aĉetis tri librojn de la finna ĵurnalisto Kalle Kniivilä en Esperanto: ***Homoj de Putin*** 2014, dua eldono 2016. ISBN 978 9077066 52 2, D/2014/2924/3, Flandra Esperanto-Ligo Frankrijklei 140, BE-2000 Antverpeno, eldonoj@fel.esperanto.be, 2016 FEL, Antverpeno. Duan libron: ***Krimeo estas nia,*** eldonita en2015 ISBN 97815956929448 www.librejo.com eldonejo MONDIAL Nov-Jorko. La tria ***Idoj de la imperio*** eldonita en 2016 ISBN 9781595693198 www.librejo.com MONDIAL Nov-Jorko.

Kalle Kniivilä estas ĵurnalisto de la taggazeto Sydsvenska Dagbladet en la urbo Lund en Svedio. Ĉiuj tri libroj enhavas intervjuojn kun homoj de diversaj opinioj el diversaj sociaj tavoloj, li priskribas ankaŭ proprajn observojn.

Pri si li skribas: Mi estas esperantisto de la jaro 1982. Kune kun mia sveda edzino Marie ni interparolas Esperante. Kun nia filo Ville (*1995) kaj filino Alva (* 1998) mi parolas finne kaj kun Marie svede. Ĉe la tablo ni klopodas paroli ĉiu per sia propra lingvo. Al tiu maniero oni povas alkutimiĝi surprize facile post la unuaj komencaj problemoj.

Plej interesis min la libro **Idoj de la imperio,** ĉar temas pri lingvaj kaj sociaj demandoj, pri kiuj atentigis min la geedzoj el Latvio, kiujn ni gastigis en la jaro 2015 en Skokovy. Mi tradukis la libron kaj serĉas eldoniston por ĝi. La traduko jam estas preta kelkajn monatojn. Kontakto al la aŭtoro: kalle@kniivila.net
Kontakto al la tradukinto drahotovaesperanto@seznam.cz

La grupo de E-mental´ ne enuis dum la somera libertempo. Sur ŝipetoj ili kunveturigis nin al kanjonoj en la Bohemia-Svisio sub Pravčická brána (Pordego de Pravĉice) kaj admiris belecon de tiu ĉi regiono. La membroj de E-mental´ partoprenis ankaŭ karitatan aranĝon "Kuro por Paraple", kiu okazis dimanĉe la 18-an de junio 2017 en Prago. La projekto "PARAPLE" helpas al homoj kun paraplegio kaj informas la publikon pri ilia vivo. La kuro okazis ĉi jare jam la 18-an fojon, sed la unuan-fojon partoprenis ankaŭ grupo de esperantistoj. Estis bele helpi, sed ankaŭ kune travivita posttagmezo ĝojigis ĉiujn partoprenantojn.

La 28-an de junio 2017 okazis jam la kvara aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental´ aĉetis brikojn por la karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui laboran trejnad-centron por handikapuloj. Ni kolektis monon por 33 brikoj! …kaj enmetis ilin en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas amasoj da turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas niajn Esperanto-brikojn, kaj do oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj. Grandan dankon al ĉiuj partoprenintoj, kiuj helpis surloke. Apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj ne hezitis sendi monon. Ankaŭ ĉi-jare en julio membroj de E-mental´ vigle partoprenis Someran Esperanto-

Studadon en Slovakio. En aŭgusto la membroj kunlaborante kun dresdenaj esperantistoj partoprenis piknikon en la belega

naturo de Saksa Svisio en Königstein. Tre bela promenado tra natura roka labirinto kun akvofaloj, bunta pikniko, kafumado kaj renkontiĝo kun amikoj. Ĉi-jare ni festas la Jaron de Zamenhof kaj pro tio ni aranĝas ĉiumonate „Toston por Zamĉjo“, ĉiu-foje ĝi okazadas en alia urbo, kie ni pendigas flagon de Esperanto sur tiaurba turo aŭ sur ponto. Per la tosto ni honoras la memoron de LLZ. Ĝi estis jam organizita somere en Zruč, Brno, Rakovník, Č.Budějovice, Liberec, Chrudim kaj en Praha. Ĝis fino de la jaro ni honorigos LLZ ankoraŭ en kelkaj lokoj kaj por tiu evento ni invitas ĉiujn interesatojn. L. Angelová

Trista anonco

La 21-an de septembro forlasis nin nia multjara kronik-ilustrantino, gvidantino de la infanaj E-gelernantoj kaj tre bona amikino Mgr. Zdenka Novotná en la 84 jaraĝo. Honoron al ŝia memoro.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 300,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 20 €. IBAN: CZ8108000000001926460283 BIC: GIBACZPX
Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.